

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (936) • 2019 •



Rejhaneh, iranano, pri pentekosta tago, laŭ la vortoj de la profeto Joel (2, 28), citata de la apostolo Petro en la Agoj de la apostoloj (2, 17). Vidu paĝon 61.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Tradicio ne estas konservado de cindro	51
Ni najbaroj en Eŭropo	53
Apostoloj kaj iliaj atributoj	58
Kongresa tagordo 2019	61
Financaj raportoj por 2018	62
Loka agado por enmigrintoj	66
Mono kaj Biblio	67
La arĥivo de Andreo Cseh	68
Sep oraj pensoj pri la vivo	69
La fenomeno Greta Thunberg	70
Kanto: Al la patrino demandas mi	71
Kanto: Nekomprenebla spirado	72

Redaktoraj vortoj

Ĉi-jare ni povas memori plurajn
historiajn okazaĵojn. Kelkaj mal-
helaj, aliaj pli helaj.

Antaŭ 100 jaroj, en junio 1919, oni
subskribis la *Traktaton de Versajlo*, kiu
oficiale finis la unuan mondmiliton.

Antaŭ 75 jaroj, same en junio,
okazis la *D-tago*, kiam la Aliancanoj
surbordiĝis en Normadio. La komenco
de la fino de la dua mondmilito.

Alia mondŝanĝa okazaĵo estis la
ekmalkonstruo de la fera kurteno inter
orienta kaj okcidenta Eŭropo en 1989.

Ne same hela memoro estas, ke antaŭ
400 jaroj la unuaj sklavoj, kaptitaj en
Angolo, estis kunportitaj al Jamestown
en nuntempa Usono.

Pro kio ni estonte memoros 2019?
Ne eblas diri, sed ĝis tio elformiĝos ni
povas memori Doris Day, kiu ĉi-jare
mortis. Ŝi famigis la kanton *Que sera, sera*.
Al tiu kanto Albrecht Kronen-
berger faris kvaran strofon, kiun vi
trovas sur paĝo 71. Bonan legadon!

“Tradicio ne estas konservado de cindro”

Papo Francisko vizitis Rumanion

Tradukis kaj adaptis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Dum tri tagoj komence de junio 2019, la Papo Francisko vizitis Rumanion.

La jena teksto troviĝas svedlingve surrete ĉe *Vatican News* en du apartaj artikoletoj, kiuj estas verkitaj de Charlotta Smeds en la Vatikana urbo. Ili estas kunmetitaj kaj tre modeste adaptitaj por Dia Regno. Serĉu ĉe <https://www.vaticannews.va/en.html>

Publikigita kun afabla permeso de Vatican News

Papo petas pardonon al la romaoj
Dum renkontiĝo kun ciganoj en Blaj dimanĉe, Papo Francisko petis pardonon al Dio kaj al romaoj pro la diskriminacio kaj apartigo, al kiu ili estis submetitaj, kaj samtempe urĝe petis la romaojn esti malfermitaj al aliaj kaj dividi siajn donacojn.

“En la Eklezio de Kristo, estas loko por ĉiuj.” Per ĉi tiuj vortoj la papo ĉirkaŭbrakis la romaojn en la kvartalo Lautaro, unu el la plej malnovaj en la transilvania urbo Blaj, historia loko por ĉi tiu popolo.

Tamen, dum la elkora renkontiĝo, la papo esprimis la doloron pro la diskriminacio kaj apartigo, al kiuj la homoj suferis, sub kiujn ankaŭ kristanoj metis ilin.

“En la nomo de la Eklezio mi petas pardonon de la Sinjoro kaj de vi, kiam ni dum pasintaj tempoj diskriminaciis vin, batis vin, aŭ rigardis vin per malico, per la okuloj de Kaino anstataŭ tiuj de

Habelo. Kiam ni ne povis estimi kaj defendi vin en tio, kio distingas vin. Estas tia indiferenteco de Kaino pri sia frato, kiu nutras antaŭjuĝon kaj koleron, kreas distancojn”.

“Kiam iu estas forlasita, la homa familio ne plu povas antaŭeniri. Ni ne estas kristanoj, eĉ ne homoj se ni ne povas rigardi personon sen niaj antaŭjuĝoj”.

Papo Francisko uzis la bibliajn fratojn Habelo kaj Kaino por priskribi, ke ĉiam ekzistas elekto: la elekto inter esti kiel Habelo, malfermita kaj ricevanta, aŭ fermita kaj ema vidi aliulojn kiel defalaĵon, kiel Kaino: “Ĉiutage ni devas elekti inter Habelo kaj Kaino”, ripetis la papo, “inter la vojo de la repaciĝo kaj la vojo de venĝo, inter sur amo bazita civiliziteco kaj malamo. Ni elektas la vojon de Jesuo – vojo kiu kostas penadon sed kondukas al paco”.

La papo parolis siajn vortojn al la nunaj romaoj kaj instigis ilin ne timi

dividi siajn specifajn trajtojn: la valoron de la vivo kaj de la familio en pli larĝa senco kun fortaj familiaj rilatoj; solidareco, gastamo, subteno kaj defendo de la plej malfortaj en sia socio; respekto al la maljunuloj, kaj por la sankteco de la vivo, spontaneco kaj ĝojo.

“Ne senigu la komunumojn, kie vi loĝas, de ĉi tiuj viaj donaĵoj, sed lasu ilin partopreni en ili, kaj ricevu tion, kion aliaj povas oferti al vi”.

“Mi volas inviti vin iri kune, kie ajn vi estas, en la konstruado de pli homa mondo, preter timo kaj suspekto, tiel ke la muroj, kiuj nin dividas, falos, kaj reciproka fido estas antaŭenigita, pacience serĉante la fratecon, kiu neniam estas senrezulta.”

Tradicio ne estas konservado de cindro. Survoje hejmen el Rumanio, la papo Francisko parolis al ĵurnalistoj kaj respondis iliajn demandojn, kiuj ne nur temis pri la vojaĝo, sed ankaŭ pri aliaj aferoj kiel eŭropa politiko kaj identeco, tradicio kaj ekumena dialogo.

La papo esprimis la deziron, ke Eŭropo revenu al la revo, kiun havis ĝiaj fondintoj.

“Se Eŭropo ne alfrontas la estontajn defiojn, ĝi malaperos. En la Eŭropa Parlamento, mi diris, ke estinte patrino, Eŭropo nun estiĝas avino: Ĉu ni alproksimiĝas al la fino de aventuro komencita antaŭ 70 jaroj? Ni vidas limojn en Eŭropo, kiuj ne estas bonaj. Estas vere, ke ĉiu lando havas sian propran identecon kaj devas protekti ĝin, sed vi ne permesu pesimismojn kaj ideologiojn venki en Eŭropo. Eŭropo estas atakita de malgrandaj grupoj de ideologioj, kiuj ĉi tie ne havas siajn

radikojn. Ni lernu de la historio. Ni ne retroiru”.

La papo ricevis demandon pri la rilato kun Benedikto XVI kaj li respondis, ke la antaŭulo estas kiel avo: “Li ne parolas multe, sed kion li diras havas la saman profundon kiel ĉiam. La problemoj estas liaj genuoj, ne lia kapo. Mi havas la povon aŭskulti lin. Mi sentas la sevon de la radikoj, kiuj helpas min antaŭeniri,” diris la papo.

La papo esprimis sian opinion pri tradicio: “La tradicio de la Eklezio ne estas muzeo. La tradicio similas al la radikoj, kiuj donas al vi potencon kreski. Sed vi ne kreskas en radikojn, vi kreskas en arbon, vi kreskas por flori, kaj doni fruktojn kiuj fariĝas semoj, kiuj estonte estos radikoj por aliaj”.

“La tradicio de la eklezio vivas”, daŭrigis la papo kaj citis la muzikiston Gustav Mahler kiu diris ke “tradicio estas la garantio por la estonteco kaj ne protektanto de la cindro”. “La tradicio ne estas la samo kiel muzeo, la nostalgia deziro de la fundamentistoj reveni al la cindroj. La tradicio estas la radikoj, kiuj garantias al arbo kreski, flori kaj doni fruktojn. Ĉiuj floroj de la arboj venas de tio, kion la arbo enterigis”, diris la papo.

La papo menciis renkontiĝon dum siaj tri tagoj en Rumanio: “Kiel la maljuna avino, kiun mi renkontis en Rumanio, kun sia nepo en siaj brakoj – ŝi estas la radikoj de siaj genepoj kreskantaj. Li ne estos kiel ŝi, sed ŝi donas sian kontribuon. Kiam geavoj havas nepojn, ili komencas revii ... troviĝas estonteco! Kaj la gejunuloj kuraĝiĝas de ili kaj daŭre konstruos historion”.



Ni najbaroj en Eŭropo

Prelego dum pentekosta kongreso 2011

Gerrit BERVELING, NL

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Hodiaŭ ni kunvenis en urbo kiu famas pro grandaj kaj gravaj historiaj momentoj: en 1648 en tiu ĉi urbo oni decidis pri la Pactraktatoj de Münster.

En 1998 oni solene festis la 350-jariĝon de tiuj Pactraktatoj, kiuj post fino de la 80-jara milito (1568-1648) unuflanke establis la sendependecon de la Respubliko de la Unuiĝintaj Nederlandoj disde la Hispana Regno; aliflanke en la 24-a de oktobro la Paco de Münster finis la militon inter la Sankta Romia Regno de Germana Nacieco kaj Francujo; tiu ĉi Paco de Münster estis unu el la 11 memstaraj pactraktatoj, kiuj kune konsistigas la Pactraktaton de Vestfaliao: tio faris en 1648 finon al la 30-jara milito, kiu tiel funde disŝiris grandan parton de Okcident-Eŭropo (1618-1648).

Ĉe vi, Germanoj, probable la memoro precipe reiras al la Packontrakto de la 24-a de oktobro: Vestfaliao, Osnabrück / Münster.

Ĉe ni, Nederlandanoj, supozeble la memoro reiras precipe al la Packontrakto kiun oni fiksas en la 30-a de januaro en la Krameramtshaus, la nuna “Haus der Niederlande”, kaj kiun iom poste oni solene priĵuris en salono en la urbodomo ĉe Prinzipalmarkt, nuntempe konata kiel “Friedenssaal”, en la 15-a de majo.

La 30-jara milito kostis la vivon al milionoj da homoj – laŭ historiistoj inter 6 kaj 12 milionoj da personoj fariĝis viktimoj – atentu: 6 ĝis 12 el la tiutempa totala loĝantaro de ĉirkaŭ 20 milionoj en la Germana Imperio.

Kaj nun ĉi tie do ni kunvenis, en tiu ĉi historie ŝarĝita urbo: urbo de packontraktoj. Urbo de paco.

La temo de nia komuna [pentekosta] Esperanto-kongreso estas “Najbaroj en Eŭropo”.

Kio estas najbaroj? Nu, la etimologio nin helpas rapide: en la *Etimologia Vortaro* de Ebbe Vilborg ni trovas, ke la vorto devenas de Angle *neighbour*, Germane *Nachbar*, Nederlande *nabuur*: la laŭlitera senco de najbaro estas *nach* = *proksime* kun *bahr* el *bauen* – *konstrui*, do la najbaro laŭlitera estas tiu, kiu proksime konstruas.

Sed kion karakterizas najbaroj?

Unuflanke ni povas pensi pri nia propra vivo: ĉu ni loĝas en urbo, vilaĝo aŭ aliloke – ĉu najbarojn ni havas? Ĉu tiujn ni konas? Ĉu tiujn ni kontaktas? Ĉu ili efektive konstruas proksime? Ĉu – kaj mi nun inversigas intence – ĉu ni konstruas proksime al ili / kun ili?

La Nederlanda termino *nabuur* por kelkaj sonas iom eksmode, laŭ iuj ĝi ĉefe estas regiona esprimo, kiu substrekas, ke al bona najbareco apartenas zorgemo pri la apude loĝantaj: se en vilaĝo ekzemple iu mortas, la najbaroj

portempe transprenas certasence la zorgon pri la familio, kune vigilas ĉe la mortinto ktp.

La Franca aŭtoro Amin Maalouf (naskita en 1949) verkis tutan serion da atentindaj libroj: unuflanke plurajn romanojn kiuj ĉiuj limas inter malsamaj kulturoj – li mem denaske devenas el Libano, loĝas en Francujo, parolas Arabe kaj France, do vivas dukulture. Ankaŭ plurajn libretojn li verkis por modernaj operoj de Finna komponistino Kaija Saariaho. Ree rande de malsamaj kulturoj. Sed precipe interesaj mi trovas du librojn liajn, kiujn li mem titolas *eseoj*, sed kiuj estas efektive tre pensinstigaj studaĵoj pri gravaj nuntempaj fenomenoj: *Les Identités neutrières* kaj *Le Dérèglement du monde*.

Mi iom volas rakonti pri la unua.

Ĉie ĉirkaŭ mi en Nederlando – kaj mi timas, ke en Germanio same – oni ege rapide venas lastatempe al la demando pri ies nacieco: se okazis iu problemo, se estis iu kverelo – tuj: ĉu estis Turko, ĉu Marokano, ĉu Nederlandano? Antaŭ kelkaj jardekoj tio estis multe malpli tuja reago.

Kiam kiel junulo 21-jara mi volis klare montri, ke mi volas ekkoni la mondon pli vaste ol estis kutimo en mia ĉirkaŭaĵo, mi aĉetis pasporton kaj trajnbileton por Zagrebo: al Jugoslavio, lando pri kiu preskaŭ nenion mi sciis. Mi ankaŭ konis neniun kiu ĝin vizitis tiuepoke. Estis tiel fore. Por mia junula sento preskaŭ sur alia mondo.

Fariĝis por mi ege grava tiu feriado: unuafoje eksterlande, kompreneble tute sola, ĉar neniun el parenkaro aŭ amikoj volis aŭ pretis akompani min. Unuafoje

en lando, kie la lingvon mi ne scipovis: en la gimnazio mi lernis la kutimajn tri modernajn fremdlingvojn, Francan, Anglan kaj Germanan, kiujn poste universitate mi bezonos. Kaj la klasikajn Latinan kaj Grekan. Sed tie – tuj post alveno en la Zagreba stacidomo mi aĉetis poŝvortareton pri la Serbokroata, trastudis la bazan gramatikon, ellernis kelkajn simplajn saluto- kaj ĝentilecofrazojn, plus la ĉefajn ciferojn – kaj jen ĉio. Tamen, kun multaj homoj, precipe kun junuloj, tie mi interparolis. De Homero mi ja lernis ke laŭ Odiseo oni ĉiam konduku: πολλῶν δ' ἀνθρώπων ἴδεν ἄστεα καὶ νόον ἔγνων – de multaj homoj urbojn li vidis kaj ekkonis pensmanieron. Do mi alparolis multajn, foje eĉ havis longajn diskutojn. En Dubrovnik en ia monaĥejo eĉ la Latinan mi povis uzi.

Reirante hejmen, kiam ekmontris sin la fundo de mia monujo, mi veturis sur ŝipo laŭ la tuta Adriatiko ĝis Rijeka. Surŝipe estis tre malmultaj turistoj, kaj preskaŭ nur soldatoj Jugoslaviaj: mi scivolis pri ili, eĉ ne povis distingi ilin: ĉu estas iu pli grava en rango? La knabo, kiun pri tio mi alparolis, ridante klarigis ke ili ja ĉiuj sin konas – ili ja *scias* kiu estas la gvidanto de la grupo. Do ne gravas. – Scivole mi informiĝis, kio li estas, ĉu Kroato aŭ Serbo aŭ .. li protestis: tio ne plu ekzistas. Ĉiuj ni estas Jugoslavo. Tio estis en 1965.

Sed ĉiuj ni scias, kio okazis kelkajn jarojn poste: disfalis Jugoslavio kaj subite ne plu ekzistis Jugoslavo, sed ja Serboj, Kroatoj, Bosnianoj ktp...

Kio estas ni homoj? Ĉu karakterizas nin nia identeco? Kaj se jes: kio estas

nia identeco? Ĉu nia politika konvinkiĝo, ĉu nia religio, ĉu nia lingvo, ĉu nia nacia deveno?

Mia impresio estas, ke tiu ĉi temo deponas la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento fariĝis ĉiam pli grava: ankaŭ inter esperantistoj ofte mi ĉeestis debatojn, ja foje akraj kvereloj eĉ: unuflanke mia baza konvinkiĝo – kiun same voĉigis tiu anonima Jugoslavia soldato sur la ŝipeto –, ke nacia deveno entute ne gravas, almenaŭ ne devas esti grava, kaj rekte male la konvinkiĝo ankaŭ de multaj fervoraj esperantistoj, ke ĝuste tiu nacieco ege gravas.

Zamenhof faras fortan distingon inter la nocio *patrioto* kaj tiu nacia sinteno.

Maalouf, en sia *Les Identités meurtrières* forte pledas por tio, ke oni montru kiom eble da identecoj: devene li estis el Libano, sed en lia parenkaro estas ligiteco kun Egiptujo same kiel kun la Osmana Regno; aliflanke li estas Franco, jam delonge Franca ŝtatanano, li estas Arablingva sed same Franclingva ktp ktp. La nuna sinteno ĉe multe da homoj, kaj en multe da gazetaraj kaj televidstacioj, limigi la identecojn laŭ difinita elektita ero: jen tio estas Islamano! lia opinio estas vere mortiga, eĉ murdiga.

Pasintan semajnon en la lernejo, kie mi laboras, mi aŭdis de koleginino, ke ŝia edzo, kiu estas Turkdevena Nederlandano, biciklis en la ĉirkaŭo de la urbo, kaj ie ĉe vojkruciĝo haltigis lin iu nekonato dirante: Mi ja konas vin! mi legis la artikolon en la gazeto pri vi! mi scias kie trovi vin, Turko! – Tio estis rekta minaco. La koncerna sinjoro en intervjuo estis klare pledinta por reci-

proka interkonatiĝo inter diversreligiaj kaj diverskulturaj grupoj, precipe kie koncernas Turkdevenajn Islamanojn kaj Nederlanddevenajn protestantojn.

Jen kiel foje funkcias nuntempe aŭ ne funkcias nia bela idealo de najbareco – *nabuuŝchap*.

Ĉar mi jam menciis la temon, mi kredas ke estas bone iom pli trakti ĝin. Eble en postaj tagoj ni trovos eblecon private inter ni plu paroli pri ĝi. Estas ja sufiĉe grava temo, mi taksas.

Dum la pasinta Malferma Tago de UEA (la 14-an de majo ĉi-jare) mi iom parolis pri, kaj kun kelkaj ĉeestantoj mi iom legis el Erasmo. Li vivis en epoko ege grava por Eŭropo: 1466/67/69? – 1536. Estas karakterize, ke lia naskiĝtago estas konata – la 27-an de oktobro –, sed la jaro ne tute certas. Datojn oni tiuepoke pendigis al kalendaro de sanktuloj, sed jaroj nu... se ne temis pri gravuloj, princoj, reĝidoj k.s.... la jaroj forgesiĝis.

Kiel ajn: Erasmo vivis dum Eŭrope grava periodo: ĝuste tiutempe eniris mirinda eltrovo la okcidentan mondon: la presarto. Tio implicis, ke libroj deponas tiam en neimageble pli granda kvanto diskoniĝis. Li estis la unua furora aŭtoro de Eŭropo – de kelkaj liaj verkoj aperis dekoj da eldonoj dum lia vivo. Eĉ pirataj eldonoj! Temas ĉe la invento de l' presarto pri kulturŝoko minimume same grava kiel nia epoko la elektronika revolucio en la Reto: kaj oni kombinis la eblecojn de la nova presarto kun grandioza entrepreno por transdoni kaj ree ekuzi ĝisfunde la jam ekzistantan tradicion Latinan kaj Grekan – tion ni nomas la Renesanco: ne Erasmo ĝin inventis, sed li estis naskita en ĝin kaj

plejentuziasme, plenergie li kontribuis al tiu flanko de la Renesanco, kies moto efektive estis *ni lernu el la pasejo por prepari nin por la estonto*, aperigante, komentariante, diskonigante valorajn verkojn de tuta serio da aŭtoroj el pasintaj epokoj: mi nur nomas la ĉefajn, kiujn Erasmo reeldonis, ofte en pligustigita eldono: Hieronimo (1516), Cipriano (1520), Arnobio (1522), Hilario (1523), Ireneo (1526), Ambrozio (1527), Aŭgustino (1528/29), Ĥrizostomo en Latina traduko (1530) kaj Bazilio (1532).

... nepre neniam ni simpligu la
mondon tiamaniere, ke ni difinu
iun ajn per unusola identeco!
Ĉiu homo estas ja konebla per
tuta amaso da identecoj

Samtempe Erasmo estas grava por la Reformacio, ĉar li – unua en la mondo – sciis aperigi *presitan* Novan Testamenton en la origina Greka kun akompana – ĝustigita – Latina traduko. Tio fariĝis furoraĵo, por multaj nuntempuloj eble iom mirige: sed oni komprenu bone, ke granda plimulto tiuepoke estis kristanoj, sekve la Nova Testamento por ili estis baza verko por la vivo. Kaj la eldono de Erasmo montris, ke plurloke la ĝistiamaj tekstoj entenis erarojn. Li ĝustigis tiujn, li komentis tion surbaze de tekstoj tra la historio: por montri de kie devenas erara interpretado kaj kiel ĝi diskonigiĝis. Al multaj tio malfermis la okulojn. La unua eldono de lia Nova Testamento aperis en 1516, kaj kiel certe vi scias, en 1517 disfamiĝis Lutero

kiu senintence kaŭzis la rompiĝon de la okcidenta kristanismo en katolikismon kaj protestantismon. Unu el ĝiaj sekvoj plej teruraj estis la multaj religiaj militoj.

La eldono de Erasmo fariĝis la bazo de la novaj nacilingvaj tradukoj kiuj grave stimulis la disvolviĝon de l' Reformacio.

Dum tuta sia vivo Erasmo mem rifuzis partianiĝi en la Reformacia debato: oni riproĉis al li, ke li estas tro senkuraĝa, ke li estas kameleono, ke li ne montras viran fortecon. Erasmo, tamen, pledis daŭre por interkompreno kiom nur eblas.

Unu el la politike gravaj temoj de lia epoko estis: kiel kondukti fronte al Islamo, kaj plej konkrete: fronte al la Turka Osmana Regno. Okazis tiujarcente marbataloj en Mediteraneo (restis fama la marbatalo ĉe Lepanto en 1571, unu el la plej grandaj marbataloj de la historio), okazis militadoj surtere ĝis eĉ minaco plej konkreta en 1683: “la Turkoj staras antaŭ la Aŭstra urbo Vieno!”

Kion diris Erasmo? En siaj *Antaŭparoloj al la Nova Testamento* li konsilas traduki la Bibliion, kaj minimume la ĉefajn partojn – evangeliojn kaj leterojn de Paŭlo – en ĉiujn naciajn lingvojn – do ankaŭ en lingvojn Turkan kaj Saracenan, kaj disponigi tiujn tekstojn al islamanoj por poste kun ili ekdebati pri la religiaj problemoj. En speciala verkaĵo pri la milito kontraŭ la Turkoj, kiun kun lernantoj miaj antaŭ du-tri jaroj mi traktis lerneje, je granda miro de miaj lernantoj Erasmo ree pledis por diskonigo de la Biblio inter islamanoj, por reciproka serioza debatado, por senperforto. Li diras, ke la kialoj,

kiujn fakte oni uzas por ataki la Turkojn tute ne taŭgas, kaj kialojn, kiuj ja povus esti taŭgaj, manko je libereco ekzemple, oni ne uzas, ĉar ankaŭ kristana flanko kulpas similmaniere pri manko de libereco ĉe la homoj.

Do, kiel kondukti al siaj najbaroj laŭ Erasmo? Se resumi simplige: kiam la najbaroj ne plaĉas, oni provu konverti ilin, nepre ne perforte sed per argumentoj, per debatoj, per rezonadoj.

Kaj ni, en nia nuna realo?

Laŭ mi estas tre senchave, atenti pri la avertoj, kiujn liveras Amin Maalouf: nepre neniam ni simpligu la mondon tiamaniere, ke ni difinu iun ajn per unusola identeco! Ĉiu homo estas ja konebla per tuta amaso da identecoj – oni nur rigardu pli atente. Mi prenu min mem, ne ĉar mi estas tiel grava, sed simple kiel ekzemplon: Jen Nederlandano, tre stulta kaj senscia pri dialektoj, homo kiu aliflanke iom dise legadas plurlingve, kiu ŝatas vojaĝi kaj ekkoni homojn, urbojn, kutimojn, homo kiu religie apartenas al kristanismo sed sen dogmaj limigoj, homo kiu serĉas kontaktojn kun alireligiaj homoj, por reciproke provi kompreni pensmanierojn, homo kiu serĉas kio instigas homojn vivi pace, vivi kun fido je estonteco, homo, kiu provas vivi en fidelo, fidinda al homoj, al parencoj, al amikoj. Se nur unu flankon oni emfazas, mil aliajn flankojn oni forgesas.

Kaj laŭ mi sama statas pri ĉiuj homoj en nia reala mondo.

Se la averton de Maalouf oni prenas serioze, ne havas sencon miaopinie, serĉi kiu estas nia aŭ niaj malamiko aŭ malamikoj. Veraj malamikoj ja ne ek-

zistas: ekzistas nur kunhomoj, homoj kiuj same kiel ni estas metitaj sur tiun ĉi mondon – neniu ja inventis sin mem. Ni troviĝas ĉi tie. Troviĝi – belega verbo – nek aktiva nek pasiva: kaj tio estas grandioza *fakto*. Ni troviĝas ĉi-monde. *Alia* instanco tion kaŭzis. Ĉu Dio ni nomu tiun instancon, aŭ ĉu prefere: la Naturo? Laŭ mi ne vere gravas.

Ni troviĝas ĉi-monde. Ni estas kvazaŭ donacoj unuj por la aliaj. Donacoj foje malfacile akcepteblaj ĉar foje ĝenaj. Ni ja povas esti ĝenaj por niaj kunhomoj – tamen: kiel ajn: al neniu el ni apartenas la mondo, neniu el ni havas kopirajton pri la vivo.

Ni troviĝas ĉi-monde. Ni estas kvazaŭ donacoj unuj por la aliaj. Donacoj foje malfacile akcepteblaj ĉar foje ĝenaj.

Tio miaopinie aŭtomate devus konduki nin al reciproka – mi dirus: *mini-muma* respekto unuj fronte al la aliaj... Mi kredas, ke Erasmo en sia tempo tion jam bone perceptis: ni povas malkonsenti kun aliaj, ni eĉ povas kontraŭi kelkajn homojn kaj iliajn ideojn aŭ idealojn, sed ni ne havas rajton pri absoluteco. Ni neeviteble estas devigataj respekti la ceterajn en ties alieco. Erasmo dirus: sendu al ili viajn sanktajn librojn – ĉion, kio al vi estas sankta, valora, neforigebla – kaj ekdiskutu pri tio.

En tiu senco mi kredas, ke ni povas esti najbaroj en Eŭropo: ĉiu konstruante proksime al la ceteraj pri ĉiam pli nova valora estonto! Mondo en kiu indas vivi.

Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

Tria parto

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Johano

Johano estis tiu disĉiplo, “kiun Jesuo amis”. Li estis la plej juna, kaj li estis la ununura apostolo kiu ne mortis martiran morton. Li estas konsiderata kiel la verkinto de la kvara evangelio, de tri apostolaj leteroj kaj de la Apokalipso.

Li devenis el Galileo, Betania. Li estis disĉiplo de Johano Baptisto, kaj kiam Johano Baptisto atestis pri Jesuo, Johano, kune kun la frato Jakobo, fariĝis disĉiplo de Jesuo.

Li sidis apud Jesuo je la lasta vespermanĝo kaj li estis la nura disĉiplo kiu akompanis Jesuon al la Golgota. Jesuo petis lin zorgi pri sia patrino, Maria.

Kun Petro li kuris al la tombo, kiam venis la novaĝo pri la resurekto de Jesuo.

Laŭdire li restis en Jerusalemo ĝis la morto de Maria kaj en la ĉirkaŭaĝo li faris sian apostolan laboron. Post la morto de Paŭlo li laboris en Efezo.

Cezaro Domitianus ekzilis lin al la insulo Patmos. Estas fontoj, laŭ kiuj li tie ricevis viziojn, laŭ kiuj li skribis la libron de Apokalipso.

Ĉirkaŭ lia cent-jaraĝo li mortis per natura morto en Efezo dum la regado de cezaro Trajano.

Lia atributo estas la kaliko laŭ Mat (20, 20–22):

20: Tiam venis al li la patrino de la filoj de Zebedeo, kun siaj filoj, adorkliniĝante kaj farante al li peton.

21: Li diris al ŝi: Kion vi volas? Ŝi diris al li: Ordonu, ke ĉi tiuj miaj du filoj povu sidi, unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre, en via regno.

22: Sed Jesuo responde diris: Vi ne scias, kion vi petas. Ĉu vi povas trinki la kalikon, kiun mi trinkos? Ili diris al li: ni povas.



En la preĝejo de la vilaĝo Habo en suda Svedio, ĉirkaŭ 1723



Jesuskirken, Kopenhago
fino de 19a jarcento



En la diocezo de Vác, Hungario

Filipo

Ankaŭ Filipo (kiel Petro kaj Andreo) devenis el la ĉirkaŭaĵo de la Galilea lago, de Betsaida.

Johano apud la elvoko trifoje menciis lin nome: je la multigado de pano; en Jerusalemo, kiam la paganoj volis vidi Jesuon, kaj je la lasta vespermanĝo.

Laŭ la pli posta tradicio li vivis kun siaj tri filinoj, kiuj estis benataj de profeta talento, en Malgrandazio en Hierapolis kaj ankaŭ mortis tie.

La Biblio pri Filipo kaj Jakobo estas sufiĉe malmultvorta, pro tio la fantazio suplementis la informojn pri li. Filipo havis gajan naturon kaj nenio povis ĝeni lian trankvilecon, ankaŭ en la plej forta ŝtormo li fajfadis. Kiam Jesuo invitis lin, li entuziasme sekvis lin.

Al Filipo, (greke: Philippos) oni atribuas unue klarajn predikojn kaj due ĉiamajn bonfarojn.

Filipo dum dudek jaroj disvastigis la

evangelion en Skitio, sed laŭ la legendo paganoj kaptis lin kaj devigis lin oferedni al la skulptaĵo de Marso. Tiam neatendite drako elvenis el la skulptaĵo kaj mortigis la ĉefpastoron, lian filon kaj la magistratulon. Aliaj per la malbonodora elspiraĵo malsaniĝis.



Filipo diris al la paganoj: KREDU al mi kaj rompu tiun ĉi skulptaĵon kaj adoru la krucon de Dio, por ke viaj malsanuloj resaniĝu kaj viaj mortintoj reviviĝu. Ili akceptis tion. Filipo per bastono forpelis la drakon al la dezerto, kaj resanigis ĉiujn, kaj revivigis la tri mortintojn. Pro tio estas lia atributo la bastono, kiu sur la bildoj kaj skulptaĵoj ofte finiĝas per kruco.

Poste Filipo iris al Azio, al Hierapolis. Dum unu jaro li laboris tie kaj li ekstermis la misinstruon de la ebonitoj, kiuj kredis, ke Jesuo havis nur ŝajnan korpon.

En lia 87a jaraĝo, paganoj kaptis kaj krucigis lin.

Daŭrigota

Skulptaĵo de hungara skulptisto István Rohonczi (1957-) en la hungara vilaĝo Apostag



Jesuskirken, Kopenhago
fino de 19a jarcento



Baziliko de Sankta Johano en Laterano
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

Loka agado por enmigrintoj

Samuel GAILLARD, FR

En mia evangelia komunumo alvenis antaŭ 3 monatoj 4 homoj el Irano. Ili fuĝis el tiu ŝtato, ĉar ili estas kristanoj kaj pro tio persekutataj. En Francio, ili estas akceptataj de la ŝtato, sed la ŝtata administracio estas ege malrapida por zorgi pri ili. Kun miaj lokaj gefratoj ni faras tion, kion ni povas por helpi ilin, sed nia helpo estas malgranda.

Tiuj 4 irananoj konas nek la landon, nek la francan administracion, nek la lingvon, nek la skribon de francaj literoj. Ĉar mi estas profesia instruisto, mi proponis al ili instrui al ili samtempe la francan lingvon kaj Esperanton.

Kaj samtempe mi mem iom lernas la persan lingvon "farsi". Ni laboras kune ĉirkaŭ 2 horojn en la semajno. Por mi estas elprovo por scii ĉu lernado de Esperanto helpas la lernadon de la franca. Mi opinias ke jes, do ni vidos la rezulton.

Hodiaŭ, mi povas prezenti al vi unuan kaj malgrandan rezulton. Post 2 monatoj da lernado, unu virino el la 4 homoj kapablas verki la bildon kiun vi trovos kun tiu-ĉi mesaĝo. Ŝi verkis tiun teksteton per ŝiaj propraj vortoj laŭ Agoj de apostoloj 1, 11, ĉar jaŭde estis la memortago de la Ĉieliro de Jesuo.



Sube alia bildo, preparita de Rejhaneh, iranano kiu konas Esperanton ekde 3 monatoj. Sur tiu bildo Rejhaneh kreis sian propran frazon laŭ sia penso : tiu frazo ne estas parafrazo de biblia versiklo. Kiel artistino ŝi kapablas diri kaj skribi belmaniere la ideojn de sia menso aŭ la pensojn de sia koro.



Mono kaj la Biblio.

Honoré SEBUHORO, Rutshuru, DR Kongo

Tre riĉa viro, kiu ne havis edzinon nek infanon, invitis siajn dungitojn al vespermanĝo kaj metis Biblion kaj grandan kvanton da mono antaŭ ĉiuj.

Je la fino de la frateca manĝo, li petis ilin elekti inter la Biblio kaj la granda kvanto da mono, kiujn li proponis.

Li komencis ĉe la gardisto, dirante al li: Elektu inter la Biblio kaj la mono.

La gardisto senhezite respondis, ke li volas preni la Biblion, sed ne scias, kiel legi, do: Mi tuj prenos la monon, kiu ja multe pli servos al mi.

Li petis la ĝardeniston elekti. Tiu respondis: Mia edzino estas tre malsana kaj mi bezonas monon por kuracigi ŝin; se ne, mi estus elektinta la Biblion.

Li demandis la kuiriston, kiu respondis: Mi amas la Biblion, sed kun la laboro mi ne havas tempon legi; do mi prenas la monon.

Fine venis la knabo, kiu zorgadis pri la bestoj. Sciante, ke li estas tre malriĉa,

la riĉulo diris al li: Vi certe elektos la monon por aĉeti al vi manĝon kaj pagi al vi ŝuojn por anstataŭi ĉi tiujn malnovajn.

La infano pripensas kaj diras: Estas vere, ke estas malfacile por mi. Estas vere, ke mi devas aĉeti novajn ŝuojn kaj kokidon por manĝi kun mia patrino, sed mi preferas la Biblion, ĉar mia patrino diris al mi: La vorto venanta de Dio estas pli valora ol oro. Ĝia gusto estas pli agrabla ol mielo.

Li do elektis la Biblion kaj trovis du kovertojn interne.

La unua enhavis dekoble la sumon sur la manĝotablo.

La dua enhavis noton, kiu asertis, ke li estos la heredanto de la riĉulo.

La riĉulo diris al ili: “Necesas ĉiam fidi je Dio kaj neniam perdi la esperon”.

Kiel vi pensas pri la Sinjoro de la sinjoroj?

☞

Pablo Picasso vizitis ekspozicion de infanaj desegnaĵoj. Post la trarigardo de la bildoj la jam naŭdekjara artisto diris:

– En ilia aĝo mi pentris kiel Rafael. Mi bezonis multajn jarojn da laboro por ke mi povu komenci pentri kiel infanoj.

El Anekdotoj pri famaj homoj

Sep oraj pensoj pri la vivo

Tradukis Honoré SEBUHORO, DR Kongo

1. Ne permesu iun esti ĉeffiguro en via vivo, kiam vi estas nur unu el pluraj eblecoj en la vivo de la alia. Rilatoj funkcias pli bone kiam ili estas egalaj.
2. Neniam klarigu vin al iu ajn. Ĉar la homo, kiu ŝatas vin, ne bezonas ĝin, kaj la persono, kiu ne ŝatas vin, ne kredos ĝin. Krome, aliaj homoj ne ŝatas aŭdi pri vi, sed homoj ŝatas paroli pri si mem.
3. Kiam vi ĉiam diras, ke vi estas okupata, vi neniam estas libera. Kiam vi ĉiam diras, ke vi ne havas tempon, vi neniam havos tempon. Kiam vi ĉiam diras, ke vi faros taskon morgaŭ, la morgaŭo ne venos. Ne faru pretekston.
4. Kiam ni vekigās matene, ni havas du simplajn elektojn. Redormi kaj daŭrigi sonĝon, aŭ vekigi kaj realigi revojn. La elekto estas via.
5. Ni plorigas tiujn, kiuj zorgas pri ni. Kaj ni ploras pro tiuj, kiuj neniam zorgas pri ni. Tio estas vero de la vivo, stranga sed vera. Kiam vi ekkomprenas tion, neniam estas tro malfrue ŝanĝi.
6. Faru neniun promeson, kiam vi ĝojas. Ne respondu, kiam vi estas malĝoja. Ne faru decidon, kiam vi estas kolera. Pensu dufoje, agu unufoje.
7. La tempo estas kiel la rivero. Vi ne povas tuŝi la saman akvon dufoje, ĉar la torento kiu estis, neniam estos plu.

Ĉi tiuj estas realaĵoj de la vivo.

Honore Sebuhero kun infanoj



La arĥivo de Andreo Cseh

Ed Borsboom, NL

En la jaro 2002 mi finverkis la manuskripton pri la biografio **VIVO DE ANDREO CSEH**. Pro pluraj romkatolikaj paragrafoj en la teksto mi kiel ne katolika persono serĉis kapablan esperantiston, kiu povis kontrollegi mian skribaĵon.

Albrecht Kronenberger konsilis al mi, fari kontakton kun Jakubinyi, la Ĉefepiskopo de Transilvanio. Li ankaŭ parolas la lingvon de Zamenhof.

Tiu ĉi diocejestro akceptis la petitan taskon kaj korektis plurajn alineojn. Krome li sendis al mi el la leter-arĥivo de la episkopa palaco plurajn leterojn de kaj pri Andreo Cseh. Pro tiu kuna laboro ni fariĝis amikoj.

Kelkajn jarojn poste en 2006 lia moŝto invitis min al la urbo Alba Julia, kie mi kvin tagojn estis la gasto en lia rezidejo. La episkopo estis tre interesita en la persono de Andreo Cseh kaj ni multe diskutis pri tiu homo kaj ties laboro por Esperanto. Krome oni montris tie al mi gravajn konstruaĵojn,

kiel la seminarion, kie Cseh studis, la faman Batthyanan bibliotekon, kaj la internulejon, en kiu troviĝis la ĉambroj de la studentoj. Cetere interkrampe, tiutempe oni metis kvar knabojn en unu ĉambrom. Impona vizito okazis al la apuda katedralo, denove en restaŭrita gloro post la komunista periodo.

En la jaro 2016 Ĉefepiskopo Jakubinyi petis sian arĥiviston elfosi la lastajn ankoraŭajn dokumentojn el 1921, en kiuj Cseh ludis rolon. Pro tio, ke la prelato sciis, ke Internacia Esperanto-Instituto posedas valoran Cseh-arĥivon, li sendis 8 iom ampleksajn dokumentarojn kun siaj klarigaj komentoj kaj resumoj al Hago. Kun profunda respekto mi nun pensas pri lia valora kontribuo al la fikso de historiaj faktoj el la Esperanta historio.

Espereble en IEI oni nun povas trovi kapablan novan arĥiviston, kiu daŭrigos la necesan savan laboron.

☞

Ĉefepiskopa palaco

/Creionul, Vikipedio, (CC BY-SA 3.0)



Batthyán-biblioteko (la alta blanka konstruaĵo)



La fenomeno Greta Thunberg kaj la mondaj demonstracioj

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

(Plejparte bazita sur diverslingvaj Vikipedioj)

Greta Thunberg, 16-jara, estas sveda lernantino kiu iĝis por-media aktivulo. En 2018 ŝi komencis striki antaŭ la parlamento en Stokholmo, Svedio. La celo estis kaj daŭre estas, ke la politikistoj ekagu por fari ŝanĝojn, kiuj efike kontraŭas la klimatoŝanĝon.

Post serio de varmo-ondoj kaj arbaraj incendioj, kiuj okazis en Svedio en 2018, Thunberg decidis ĉesi iri al la lernejo. Dum tagoj ŝi protestis ĉe la Sveda Parlamento petante la registaron plenumi la postulojn de la Pariza interkonsento pri CO kaj klimata ŝanĝo. Post la svedaj ĝeneralaj elektoj (septembro 2018), Thunberg daŭrigis la lernejan strikadon, sed mankis en klaso nur vendrede. Thunberg poste kunigis multajn aliajn protestojn, interne kaj ekstere de sia lando.

Ŝia alvoko al la lernejo-striko sukcesis kapti tutmondan atenton kaj havas subtenantojn en Germanio, Finnlando, Danio, Aŭstralio kaj aliaj landoj. La 15an de marto 2019, laŭtakse 1,4 milionoj da studentoj en 112 landoj ĉirkaŭ la mondo aliĝis al ŝia alvoko protestadi. Simila okazaĵo envolvigante studentojn en 125 landoj okazis la 24an de majo 2019.

Pro sia agado ŝi estis invitata paroli ĉe multaj konferencoj, ekzemple dum

la konferenco pri la klimatoŝanĝo en Katowice (COP24) kaj ĉe la Monda Ekonomia Forumo en Davos. Al tiaj kunvenoj ŝi ĉiam vojaĝas per trajno, neniam flugas. Vizitante Italion Greta Thunberg ankaŭ havis eblecon mal-longe paroli kun la papo Francisko.

Thunberg ricevis diversajn premiojn pro sia agado. En marto de 2019, tri membroj de la norvega parlamento nomumis Thunberg por la Nobel-pacpremio. En majo 2019, en la aĝo de 16, ŝi aperis sur la kovrilo de la revuo Time. Iuj amaskomunikiloj priskribis ŝian influon sur la monda scenejo kiel la “Efikon de Greta Thunberg”.

☞



Greta Thunberg kun ŝildo “Lerneja striko por la klimato”. /Fotis Anders Hellberg, CC BY-SA 4.0 /Vikipedio

Financa raporto de KELI 2018 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2017	2018
Aktivoj			
	Stoko de libroj	4.925,03	4.925,03
	Stoko de kasedoj, E-Misio	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
	<i>Provizo</i>	5.041,03	5.041,03
	Kasista kaso	50,00	20,00
	Sekretaria kaso	1.688,00	4.087,00
	UEA-konto kelk-p	23.713,30	27.146,20
	Ĝir-konto, CIC-banko	933,35	1.383,57
	Ŝpar-konto, CIC -banko	29.414,69	26.529,29
	CE bank-konto	<u>196,80</u>	<u>0,00</u>
	<i>Monrimedoj</i>	55.996,01	59.166,06
	Sumo de aktivoj	61.037,04	64.207,09
Pasivoj			
	Kapitalo	21.073,86	19.591,96
	Rezulto de la jaro	<u>-1.481,90</u>	<u>1.972,22</u>
	<i>Kapitalo entute</i>	19.591,96	21.564,18
	Dumvivaj membroj	2.004,50	1.889,50
	E-Misio	6.894,51	6.894,51
	Helpa kaso	1.850,08	1.850,08
	Kongresa rezerva kaso	1.823,48	1.823,48
	Literatura/Himnara kaso	12.941,57	12.941,57
	Heredaĵo de Pamela Jackson	11.161,44	11.161,44
	Mondonaco de K.U.N.E.	<u>4.000,00</u>	<u>4.000,00</u>
	<i>Fondusoj entute</i>	40.675,58	40.557,58
	Kreditoroj (finna kaj brita kaso)	0,00	1.176,00
	Evidente	457,00	696,83
	KELI-abonoj de EK	12,50	12,50
	Kongresaj kotizoj	<u>300,00</u>	<u>200,00</u>
	<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	769,50	2.085,33
	Sumo de pasivoj	61.037,04	64.207,09

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2018.12.31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2018 ne ŝanĝiĝis la stoko de libroj aŭ kasedoj. Nova inventuro kaj donacado al malriĉaj, nepagipovaj landoj estas decidita.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe franca CIC-banko (ĝir-kaj ŝparkonto). La bankkonton ĉe la franca CE-banko ni nuligis, ĉar ĉe CIC-banko ni ricevis pli bonajn kondiĉojn.

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2018 estis pozitiva: 1.972,22 Eŭroj.

Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. En 2017 KELI ricevis heredaĵon (11.161,44 Eŭrojn) de sinjorino Pamela Jackson, la vidvino de iama brita KELI-ano Mervyn Jackson.

Same en 2017, decidis la finon de la funkciado la nederlanda sekcio de KELI (KUNE), kaj ili mondonacis al nia ligo 4.000 Eŭrojn. La nederlandaj membroj pagos siajn kotizojn rekte al unu el la KELI kontoj. Pri la uzado de tiuj sumoj ankoraŭ ne okazis decido.

Transitajoj kaj pasivoj

La ĉi-jara (2018) ekumena kongreso havis profiton, kiun laŭ la nombro de la partoprenintoj ni dividas kun IKUE. En la jaro 2018, kiel en ĉiuj jaroj, KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). KELI-anoj mendas la gazeton Espero Katolika tra la konto de kelk-p. Ĉiuj tiuj sumoj jam estas transkontigitaj.

La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ- kaj kongreskotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝirataj al LKK.

Rezulto 2018 kaj buĝetoj 2018, 2019 kaj 2020 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2018	Rezulto 2018	Buĝeto 2019	Buĝeto 2020
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.000	3.731,00	2.000	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0,00	0	0
Adopta Kaso	<u>400</u>	<u>207,50</u>	<u>300</u>	<u>300</u>
<i>Kotizoj entute</i>	2.400	3.938,50	2.300	2.300
Librovendado	50	20,00	50	50
Rentumoj	250	114,60	150	150
Profito el kongreso	<u>200</u>	<u>1.180,00</u>	<u>200</u>	<u>200</u>
<i>Aliaj enspezoj</i>	500	1.314,60	400	400
Enspezoj entute	2.900	5.253,10	2.700	2.700
Elspezoj				
Presisto + sendado de DR	2.600	2.759,00	2.600	2.600
Perantoj	<u>0</u>	<u>0,00</u>	<u>0</u>	<u>0</u>
<i>Revuokostoj</i>	2.600	2.759,00	2.600	2.600
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	<u>20</u>	<u>20,00</u>	<u>20</u>	<u>20</u>
<i>Estrarkostoj</i>	260	260,00	260	260
UEA-kotizo	65	64,00	65	65
Bankkostoj	250	144,88	150	150
Merituloj	50	13,00	50	50
UK Lukostoj	<u>50</u>	<u>40,00</u>	<u>50</u>	<u>50</u>
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	415	261,88	315	315
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Malprofito de la kongreso		0,00		
Rabatoj de perantoj	<u>5</u>	<u>0,00</u>	<u>5</u>	<u>5</u>
<i>Aliaj elspezoj</i>	25	0,00	25	25
Elspezoj entute	3.300	3.280,88	3.200	3.200
Saldoj	-400	1.972,22	-500	-500

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2018 kaj la Buĝetoj 2019/2020

Enspezoj

Kotizoj

La kotizoj en 2018 estis multe pli altaj ol planitaj, ĉar fine plurjara kotizo de svedaj membroj alvenis ĉijare. Bedaŭrinde al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Ne multe da librovendado okazis en 2018. Ĉie en la mondo malaltiĝis la rentumoj, do ambaŭ sumoj estis pli malaltaj ol ni planis. Kvankam ne estas celo, nia kongreso en 2018 havis sufiĉe altan profiton.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2018 la kostoj estis la planitaj sumoj.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2018 estis la UEA-kotizoj, la bankkostoj, malgrandaj donacoj al LKK kaj la luado de salono dum 103-a UK.

Aliaj elspezoj

Aliaj elspezoj ne okazis en 2018.

Saldoj

La saldo de la jaro 2018 estis pozitiva: 1.972,22 Eŭroj.

La elspezoj okazis laŭ niaj planoj, sed la enspezoj pro alveno de plurjaraj kotizoj kompreneble multe altiĝis.

La financa bazo de KELI daŭre estas kontentiga.

Buĝetoj

La buĝetoj de la jaroj 2019 kaj 2020 tamen enhavas modestan negativan rezulton. Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligan, kaj ankaŭ partoprenos la somerajn kongresojn.

Tagordo por la Jarkunveno de KELI 2019

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretariaj raportoj
- 7 Kasistaj raportoj
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raportoj
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2020
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

- (12) *Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Philippe Cousson kaj Samuel Gaillard. Ambaŭ estas reelekteblaj.*
- (13) *Propono pri la KELI-kongreso 2020 ne alvenis*

Letero de Albrecht Kronenberger al la redakcio

Oni ofte parolas pri klimato-ŝanĝo kaj ter-plivarmigo. Laŭ mi oni parolu pli trafe pri klimato-ŝanĝiĝo kaj ter-plivarmiĝo, Ĉar la homa kontribuo ŝajnas al mi bagatela kompare kun ekz. vulkan-erupcioj aŭ terglob-aksa migrado. Glaci-epokoj kaj varm-epokoj okazis sen homa farado. Ke Germanujo estis kovrita portempe per ĝlaciĉeroj kaj en aliaj tempoj per tropikaj praarbaroj, tion tute certe ne kaŭzis homoj.

Pli necese estus plani konkretajn paŝojn por pluvivi malgraŭ la ter-plivarmiĝo, ekzemple:

- organizi la nutradon de tiuj homoj, kies regionoj stepiĝas aŭ dezertiĝas,
- serĉi jam nun lokojn sekurajn por la loĝantoj de tiuj urboj, kiuj baldaŭ estos inunditaj,
- vekti la pretecon por dividi sian propran vivo-teron kun aliaj homoj, kies vivo-tereno malaperas.

Tamen, memkompreneble, ni protektu nian medion, por ke ni kaj niaj posteuloj ankaŭ estonte havu freŝan aeron kaj puran akvon. Sed ni ne pensu, ke ni per tio povus haltigi la klimato-ŝanĝiĝon.

Al la patrin' demandis mi

QUE SERA, SERA • WHATEVER WILL BE, WILL BE

1. Al la pa-trin' de-man-dis mi: «Ki-el mi
2. Al la ka-rul' de-man-dis mi: «Ki-a ĝi
3. Nun mi-a fil' de-man-das min: «Ki-el mi
4. Kaj en la hor' de mi-a mort' mi min de-
vi - vos en la es - tont'? Ĉu en be - le - co
es - tos, ni - a es - tont'? Ĉu ĉi - el - ar - ke
vi - vos en la es - tont'? Ĉu ad - mi - ri - te
man - dos: «Ki - a la sort'? Ĉu por e - ter - ne
kaj en ri - ĉec'?» Ŝi - a res - pond' al mi:
ta - gon post tag'?» Dol - ĉe res - pon - dis li:
kaj en fe - liĉ'?» Mi kun te - ner' al li:
for aŭ en glori'?» Jen la kon - so - la vort':
«Que se - ra, se - ra. What - e - ver will
be, will be. 1.-3. Ka - ŝi - tas la ont' al ni.
4. Sed ko - nas la on - ton Di'.
Que se - ra, se - ra. What will be, will be.»
Kaj Li a - mas vin per e - ter - na am',
per e - ter - na am'.»

QUE SERA, SERA • WHATEVER WILL BE, WILL BE • M kaj angla T (strofoj 1-3): Jay Livingston kaj Ray Evans
1956 por la filmo «The man who knew too much» de Alfred Hitchcock, kantita de Doris Day (1922-2019) • ©
Copyright control • E (4a strofo originale verkita): Albrecht Kronenberger 2019-05-20

Jer 31,3 Mi ekamis vin per amo eterna.

Nekomprenebla spirado

EIN UNBEGREIFLICHES ATMEN



1. Ne-kom-pre - ne-bla spi - ra - do i - ras,
2. Vi___ la sun'___ de ĉi - es o - ku - loj.
3. Vi___ la sci'___ en ĉi - u in - stru - o.
4. = 1.



Di', in - ter Vi kaj mi___ kon - stan - te.
Vi la bel - son' en ĉi - es o - re - loj.
Vi la spi - rit' en ĉi - u sa - ĝe - co.



Mul - tajn mi - ra - klojn, mi - rin - da - ĵojn
Vi___ la voĉ' de ĉi - uj vor - toj.
Vi___ la ord' de ĉi - u es - tan - to.



ne - el - di - re - blajn mi vi - das en ĝi.
Vi___ la for - to de ĉi - u pi - ec'.
Vi___ la vi - vo en ĉi - u vi - vant'.

Jen la germana teksto:

Himmlicher Vater,
zwischen dir und mir geht immerfort ein unbegreifliches Atmen,
worin ich viele Wunder und unaussprechliche Dinge erkenne und sehe.

Du bist die Sonne aller Augen, du bist die Lust aller Ohren,
du bist die Stimme aller Worte und die Kraft aller Frömmigkeit,

du bist die Lehre aller Weisheit, das Leben allen Lebenden
und die Ordnung alles dessen, was ist.

el: Die Losungen 2019-02-04

EIN UNBEGREIFLICHES ATMEN • germana T: Mechthild von Magdeburg, en:
Offenbarungen (Das fließende Licht der Gottheit) • M kaj E: Albrecht Kronenberger 2018-11-23